



花子(はなご)

狂言記 卷五の六
登場人物: 殿、上臈、冠者

Damo Hanago

el "Kyôgenki" vol. 5.6
tradukis Simatani Takesi 2018

殿 (長袂、小刀)「冠者あるかいやい」

冠者 (狂言袂)「御前 (おまへ) に」

殿「此程は花子様へ参らぬほどに、心変わりか
と、不審のなされうわいな」

冠者「まことにさやうで御ざります」

殿「身は今晚、花子様へ参るほどに、なんぢを頼
みたい事が有 (ある)、聞いてくりやうか」

冠者「是はいまめかしい事を御意なされる物か
な、何なりとも御せ付けられませう」

殿「おふ、嬉しい物かな、いや、別の儀ではなひ
が、内の山の神をだまして、暇をもうらうた、そのだ
ましやうは、一七日 (いちしちにち) が内、座禅の致
すほどに、その内身が前へ参るなど、いろ〜だ
ましてあれば、やう〜、合点 (がてん) のしてあ
るほどに、それがしは花子様へ参り、此程 (ほ
ど) のしわをのぼさうと思ふ、なんぢは此座禅ぶ
すまをかぶって、それがしが帰るまで、座禅をして
くれい、もし山の神が来て、何かと言ふとも、か
ぶりばかり振って、物ばし言ふな、かならず
〜、あらはれぬやうにしていよ、頼むぞ
〜」

冠者「是は迷惑な事で御ざる、もしあらはれま
したらば、上様 (かみさま) のわたくしを、打ち殺
さつしやりやう、此儀におみてはなりますま
ひ」

殿「やあ、なるまひとは、それがしはおそろしうなふ
て、上様がおそろしいか、それへ直れ、討って捨
てふ」

冠者「まづ、待たつしやれませい、上様より、殿様
こそおそろしう御ざれ、いかやうとも、御意次第
に致しますえう」

殿「しかとさうか」

冠者「中〜、何のいつはりか御ざりませう」

殿「おふ〜、かわい者よな、是も花子様へ参
りたさに、おどしにこそは言ひつれ、其儀なら
ば、万事頼むぞよ、さあ、此座禅ぶすまをか
ぶってみよ、様子を見やう、一段〜、身
は、も参る、やがて戻らうぞよ、かならず〜
物ばし言ふな、さらば〜、頓 (やが) て帰
る」

冠者「殿様〜、やがて帰らつしやれませひ
や」

Sinjoro: (Kun longa kamisimo kaj mal-
longa glavo) Mi estas Sinjoro en ĉi
tiu loko. Kie estas Tarookazyza?

Tarookazyza: (Kun Kyoogen-stila kami-
simo) ♪ Jen antaŭ vi!

S: Longe mi ne vizitis la amatinon Hanago.
Ŝi timas, ke mi perdis simpation al Ŝi.

T: Certe lamentas Damo Hanago.

S: Hodiaŭ yespere mi vizitos Damon
Hanago. Ĉu vi povas helpi min?

T: Ne necesas via demando. Ion ajn
volonte mi faros por Sinjoro.

S: Mi ĝojas pro via fideleco. Mi
trompis Mastrinon, ke sep tagojn
mi sidados en ĉi tiu ĉambro kaj
preĝos por feliĉo en alia mondo. Ŝi
devos ne vidi min. Dume mi vizitos
la Damon Hanago por renovigi nian
amon. Per ĉi tiu kovrilo kovru vian
korpon kaj sidu ĉi tie. Kiam venos
kaj alparolos Mastrino, skuu vian
kapon kaj diru nenion. Nepre kaŝu
mian foreston.

T: Ho, granda embaraso! Se mi estos
senmaskita, Mastrino certe mortigos
min! Neniel mi povas plenumi tiun
ordonon!

S: Vi rifuzas mian ordonon! Vi timas
ne min, sed Mastrinon! Sidiĝu tie!
Vi mortu per mia glavo!

T: Atendu momenton! Vi estas
multe pli terura ol Mastrino. Ian ajn
ordonon mi plenumos por vi.

S: Ĉu vi nepre faros?

T: Nepre mi faros. Kredu min, Sinjoro!

S: Ha, ha! Plej fidela servisto vi estas.
Mi timigis vin pro sopiro al Damo
Hanago. Mi ĝoje fidas vin. Sukceso
dependas de vi. Nun kovru vin per
kovrilo... Ĉu vi similas al mi? Tre
bone! Jam mi foriros kaj baldaŭ
revenos. Nepre ne eligu voĉon. Ĝis la
mateno!

T: Mi sopire atentos vin! Plej baldaŭ
revenu, mi petas!

S: Ne ĝenu vin! Atendu min trankvile.

殿「はつて、気遣をするな」

冠者「殿様〜、慮外ながら、花子様へ御ざり
ましたら、御内（みうち）の紅梅に言（こと）ずて申
たと、おつしやれて下されませい」

殿「まことにそれよ〜、今度はなんぢを連れて
行き、紅梅に会わせうほどに、嬉しいと思
へ」

冠者「あ>、かたじけなふ御ざりまする」

殿「やれ〜 嬉しや、まづ急いで花子様へ参ら
ふ」(中入)

上臈（美男かづら）「わらはが殿御は一七日が
内、座禅へ入（い）らせらるゝとて、わらはに暇
をもらひ、湯をも水をも参らぬが、あまり笑止に
思ひまする、座禅の内、わらはにも見舞まする
など仰せられては御ざれども、あまりこらへられ
ませぬほどに、よそながら様子を見ませうと思ひ
まする、扱（さて）も〜、座禅ぶすまをかぶり、
窮屈に御座らふ、申〜、その若ひなりで
何の行がいりませうそ、それでは命もない事で
御ざる、何にてもちと参りませいのふ、あ>、軽
忽（きょうこつ）や、物をばおつしやれいで、かぶり
ばかり振らつしやるわいやい、いやといふ事は御
ざるまひ、此ぶすまを取らつしやれませい、是非
とも取りまする」

冠者「あ、悲しや〜、許さつしやれませい」

上臈「是はさて、殿かと思ふたれば、をのれめは
何してこゝに居るぞ、のふ腹立ちや、殿はどち
へやつたそ、言へ、言わずばおのれ打ち殺す
ぞ」

冠者「あ>、申ませう〜、命があつてこそ、申ま
せう〜」

上臈「早う言へ〜、のふ腹立ちや」

冠者「殿様は、花子様へ行程に」

上臈「やい、おどれさへ、『花子様』とぬかす
か」

冠者「いや、花子様へ御ざりました。『此ぶすま
をかぶりにあよ』と仰せられて御ざるほどに、い
ろ〜 斟酌申ましたれば、刀を抜いて切らふと
さつしやれた、いやと申せば、たちまち切られま
する、ぜひにおよばず、かやうに致しまして御ざ
る、わたくしのでやりましたでは御ざりませぬほど
に、命を助けて下されませい（こゝにて泣く）」

上臈「さては、いやと言ふたれども、切ろうとした
によつて、ぜひにおよばなんだと言ふか」

冠者「中〜、その通りで御ざる（泣く）」

上臈「是はかうもあらふ、またわらはが頼みたい
事が有が、聞いてくりやうか」

冠者「あのおつしやる事わいやい、上様の御用な

T: Sinjoro, sinjoro! Mi arogas al mi
peti vin: Ĉe Damo Hanago
transdonu mian saluton al Koobai, la
servistino.

S: Certe mi transdonos la saluton al
via amatino! En la venonta fojo
ankaŭ vi iros kaj vidos Koobai!

T: Ho, elkore mi dankas pro via favoro!

S: Kia ĝojo! Mi rapidu al Damo
Hanago. (interakto)

Mastrino: (Kun blanka tolo sur la kapo) Mia
edzo sidas por septaga asketado. Li
rifuzas min kaj abstinas manĝi kaj trinki.
Ekscesa asketado damaĝos mian edzon!
Kvankam li rifuzas mian viziton, mi iru
kaj vidu lin de ekstere... Ho, li sidas sen
kuseno. Tro kompatinde! Kvankam li
rifuzas mian viziton, mi observu lin de
fore... Mia edzo sidas sub peza kovrilo.
Certe suferigas lin severa asketado...
Hej, mia kara! Vi estas juna kaj ankoraŭ
ne necesas preĝi por feliĉo en alia
mondo!.. Ve, strange! Li ne respondas,
sed skuas la kapon... Hej, mia kara,
forigu pezan kovrilon! Nepre forigu
suferigan kovrilon!

T: Ve, senmaskite! Pardonu min!

M: Vi ne estas Sinjoro, sed Taroo-
kazya! Kial vi sidis ĉi tie? Kia
ofendo! Kien foriris Sinjoro? Konfesu
aŭ mi mortigos vin per bato!

T: Mi konfesos! Ne mortigu min! Mi
diros, kie estas Sinjoro.

M: Diru senprokraste! Vi ofendis min!

T: Sinjoro estas ĉe Damo Hanago.

M: Ba! Ĉu vi nomas la virinon Damo
Hanago?

T: Mi eraris! Sinjoro iris al la Virinaĉo
Hanago. Li ordonis min sidi sub
kovrilo. Kiam mi rifuzis, Sinjoro volis
mortigi min per glavo. Morti per
glavo aŭ sidi ĉi tie. Ne estis alia vojo.
Mi sidis malgraŭvole! Ne mortigu
min, mi petas! (Tarookazya ploras)

M: Vi detenis lin kaj Sinjoro volis mortigi
vin per glavo. Tial vi devis sidi ĉi tie?

T: Vi pravas, Mastrino. (ploras)

M: Vi plenumis la ordonon de Sinjoro.
Nun vi plenumos ankaŭ la mian?

T: Ion ajn mi faros por Mastrino. Por

らば、命なりとも捨てませう」
上臈「おふ、嬉しや、それならば、此座禅ぶすまをわらはに着せて、なんぢがごとくにしておひてくれい」

冠者「是はひよんな事を仰せられる、殿様の帰らつしやれたらば、またわたくしを殺さつしやれませう、是は御免さつしやれて下されませう」

上臈「おのれめは殿はおおふて、わらははこわふはないか、で、打ち殺そ」

冠者「あゝ、着せませう、命のあつてこそ、着せませう」

上臈「急いで着せい、やい冠者よ、殿の姿によく似たか」

冠者「そのまゝ殿様で御ざる」

上臈「おふ、かわいの物や、汝は上京(かみぎょう)の伯母が所へ行け、殿の機嫌を見て、呼びにやらふぞ、早う急いで行け」

冠者「畏て御ざる、よき時分に人を下されませい、扱も、情なひ事に会ひました、まづ上京へ参る」

殿「小袖をうち掛け、壺折つて、さばき髪にて出(いづ)る(小歌)綾の錦の下紐(したひぼ)は、解けて中よしなや、柳の糸の乱れ心、いつ忘れぬ。(小歌)はると送り来て、面影の立つ方を、返り見たれば、月細く残りたり名残惜しやの

殿「はつ、それがしがおもしろきまゝに、独り事を申てある、太郎冠者が待かにやう、まづ帰て、喜ばせうと存ずる」

殿「やれ、人の主(しう)にはなりたい物じや、それがしが申付たごとく、すごといまする、やい太郎冠者、今帰つて有わいやい、何とて物は言わぬぞ、さぞ窮屈にあらふな、さりながら、なんぢも嬉しいと思へ、お目にかゝるとまづ、なんぢが事を問はつしやれてあるぞ、ついでに此程の様子を語つて聞かせう、まづあれへ参ると、何とやらひそかにあつたほどに、不思議な事ぢやと思ふて、そつと差し寄つて、内の様子を聞いてあれば、花子様の声にて、物と仰せられた。(小歌)灯火(ともしひ)暗うして、物の寂しさ折節(おりふし)に、君が来たるにや」

殿「とおつしやれた、是はかたじけなひ事ぢやと思ふて、妻戸をほととたいてあれば、其時又、物とおつしやれた。(小歌)いとど名の立つ折節に、誰そや妻戸をきりとす」

殿「とおつしやれた、そこで、それがしも返歌を致した。(小歌)雨の降る夜に、誰が濡れて来(こ)その、誰そよとどがむるは、人二人待つ身か」

殿「そこで、内よりも花子様の出さつしやれて、

vi mi oferos eĉ mian vivon.

M: Mi ĝojas pro via fideleco. Ĉi tie kovru min per la kovrilo same kiel vin sidantan.

T: Ho, terure! Kiam Sinjoro revenos, li certe mortigos min! Neniel mi povas plenumi tiun ordonon!

M: Vi timas ne min, sed Sinjoron! Vi mortu per mia bato!

T: Atendu momenton! Mi kovros vin per kovrilo. Ne mortigu min, mi petas.

M: Rapidu vesti min... Ĉu mi ŝajnas kiel Sinjoro?

T: Komplete vi similas al Sinjoro!

M: Ha, ha! Plej fidela servisto vi estas. Vizitu mian onklinon en Norda Kioto! Revenu, nur kiam mi revokos vin.

T: Laŭ via ordono! Revoku min, kiam Sinjoro forgesos la aferon!.. Ve al mia malfeliĉo. Mi rapidu al Norda Kioto.

Sinjoro: (Kun surkimono sur ŝultroj, basko refaldita kaj haroj distaŭzitaj)

♪ Lozas la zono de brokata kimono. Amo estu sekreto. Belas mia floreto.

♪ Defore vi tra vojo min sekvis en ĉi-fojo. Foras vi sen adiaŭ, restas luno hodiaŭ.

S: Jam mi ĉesu monologi sensencaĵon, ĉar urĝe min atendas Tarookazyja. Mi rapidu al la hejmo.

S: Estas bone, ke mi estas sinjoro kaj servisto helpas min. Malgaje li sidas. Hej, Tarookazyja, mi estas hejme! Kial vi silentas? Ĝenis vin sidado. Tamen vi ĝojos, ke Damo Hanago zorgas pri vi kaj ĉe unua vido demandis, kiel fartas Tarookazyja. Mi rakontu al vi pri la vizito: Kiam mi alvenis, tie regis silento. Antaŭ la vilao mi streĉis la orelojn. Tiam aŭdiĝis kanto de la Damo: ♪ Atendo en obskuro Mi sidas sen plezuro Ĉu venos vi laŭ ĵuro?

S: Mi ĝojis, ke ŝi sopiras min. Frap', frap'! Flankan pardon mi batis. Damo Hanago kantis: ♪ Min klaĉas oni morde. Kiu venis dumnokte? Grincigas grilo porde.

S: Al ŝia kanto mi respondis: ♪ En nokto pluvus gute. Ĉu vi forgesis tute? Vizitis viro vin salutute.

S: Elvenis Damo Hanago. Ŝi prenis mian

それがしが手を取りて、奥の間へ連れて、『さても〜、雨の降(ふる)によござりました、まづ上を脱がつしゃれい』とて、おきり物を着せて下されて、色〜のつもる物語、舞ふつ謡ふつ、遊ぶほどに、はや夜明の鳥が鳴いた、『まだ半時もせぬのに、夜明けの鳥が鳴きます、もはや御暇申』と言へば、其時花子様、物とおっしゃれた」

殿「(小歌)〜は山陰(やまかげ) 森の下〜
月夜鳥はいつも鳴く、しめておよれの夜は夜中」

殿「とおっしゃれた、『御意では御ざれども、夜も明けますれば、人も見まする、やがて参らふ』と申てあれば、そこで花子様の、いつ御意なされぬ事を仰せられた、『こなたの上様の姿が見たう御座るのふ』とおっしゃれた、そこで某が、山の神が姿を小歌に謡ふた」

殿「(小歌)〜人の妻見てわが妻見れば〜、深山の奥のこけ猿めが、雨にしよぼ濡れて、ついつくぼうたにさも似た」

殿「と申、謡ふてあれば、どつと笑はつしゃれた。また此小袖は、花子様の形見なれ共、山の神が見たらば、よひ事はあるまひ、たゞ捨てふ」

殿「(謡)〜捨ててもおかれず、取れば面影に立まさり、起き伏し分かで枕より、跡より恋の責め来れば、せん方涙に伏し沈む事ぞ悲しけれ」

殿「とかく汝にやる程に、構へて山の神に見せるな、比座禅ぶすまを取れ、身が居代るぞ」
上臈「なに、山の神に見せるな、よい座禅じゃの、そなたの座禅は」

殿「はつ、是はいかな事」

上臈「如何(いかな) 事と云事は有まい」

殿「こらへたもれ、御免〜」

上臈「どこへ、やるまい〜」

(終わり)

manon kaj invitis min en la ĉambron. Ŝi diris: **Mi dankas, ke vi venis en pluva nokto. Bonvolu revesti vin...** Ŝi donis al mi sekan kimonon. Tra la nokto ni interparolis kaj ludis per dancoj kaj kantoj ĝis grakis korvoj. Al Damo Hanago mi diris: Ankorau ne pasis horo kaj jam grakas korvoj. Foriri mi devas... Ŝi diris al mi:

S: 🎵 **Ĉi tie ĉe montaro malhelas en arbaro. Sub luno grakas korvo. Ankoraŭ noktas por la paro.**

S: Mi respondis al ŝi: Kvankam vi retenas min, baldaŭ tagiĝos kaj oni vidos min. Ĝisrevidi ni devas. Tiam Damo Hanago diris eble ŝerce: **Mi volus vidi vian Mastrinon.** Al ŝiaj vortoj mi priskribis la edzinon per kanto:

S: 🎵 Malsame al aliaj similas la edzino simion jam kadukan kaŭrantan por abstino.

S: Pro mia kanto ŝi eksplodis per rido. (ridas kaj ploras) Ĉi tiu kimono estas donaco de Damo Hanago. Mia edzino ne vidu ĝin. Ĉu mi forĵetu la donacon?

S: 🎵 Forĵeti la donacon detenas la memoro. Bildiĝas vi en songo absorba de amoro.

S: Vi prenu tiun, kiun ne vidu Mastrino! Redonu la kovrilon. Mi sidos anstataŭ vi. Mastrino: Ne vidu Mastrino? Kiel amuza estas via asketado!

S: Ha, vi aŭdis min!

M: Jes, mi aŭdis pri via aventuro!

S: Domaĝe! Pardonu min, pardonu min!

M: Kien vi iras? Mi ne pardonos vin, mi ne pardonos vin! (fino)